

kontakto



N-ro 3
Volumo 4/1967

KONTAKTO - REVUO DE TEJO

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

ESTRARO DE T.E.J.O.

Ivo Osibov, prezidanto, Braće Santini 33, Split, Jugoslavio

D-ro Humphrey Tonkin, ĝenerala sekretario, Departement of English, University of Pennsylvania, Philadelphia, Pa. 19104, Usono

Ulrich Lins, vicprezidanto, estrarano pri „Kontakto”, Gemarkenstr. 146, 5 Köln-Dellbrück, Germanio

Roman Dobrzynski, vicprezidanto, organizaĵaj demandoj, ul. Garwolinska 14/64, Warszawa 44, Pollando

Wouter Pilger, kasisto, Vermeerstr. 7, Zaandam-W, Nederlando

Hans Bakker, estrarano pri NEJO, Kastelenstraat 231, Amsterdam-Zuid, Nederlando

Senad Ćolic, regiona agado, studentaj aferoj, Halilbašica 23, Sarajevo, Jugoslavio

Petr Todorov, lerneja kaj kultura agado, str. Sredna gora 88, Sofia, Bulgario



LANDAJ SEKCIOJ DE TEJO

ARGENTINO: Ruben Feldman Gonzalez, Bv. Orono 866 „A”, Rosario.

AŬSTRALIO: F. Marquerite Fink, 88 Headingley Road, Mt. Waverley, Vic.

AŬSTRIO: D-ro H.M. Maitzen, Mozartgasse 4, A-8010 Graz

BELGIO: Roger Van Humbeeck, Dambruggestraat 296, Antwerpen

BRITIO: Peter Kelton Groves, 2 Edwina Gardens, Ilford, Essex

BULGARIO: BEJ, p.k. 587, Sofia

FRANCIO: JEFO, 34 rue de Chabrol, Paris X

GERMANIO: Uwe Joachim Moritz, Hafenstr. 75, D-44 Münster

HISPANIO: Salvador Aragay, Arce 8-8-4, Cornella (Barcelona)

HUNGARIO: HEJ, Kenyérmező u. 6, Budapest VIII

ITALIO: Edvigo Tantin, via Cappello 7/3, I 34124 Trieste

JAPANIO: JEJO, Hongo 2-2-14, Bunkyo-ku, Tokyo

JUGOSLAVIO: JEJA, Dobrinjska 12, Beograd

KOREO: Taekeng Kim, 104-43 An Ardong, Seong-Puk, Seoul

MADAGASKARO: R. C. Desroches, IV.X. 39 Ankazomanga, Tananarive

NEDERLANDO: Robbert Groeneveld, James Wattstraat 75, k.654, Amsterdam-6

NORDAMERIKO: Arthur Morse, 4 Central Street, Millers Falls, Mass. 01349

NOVZELANDO: Tony Richardson, 78 Thackeray Street, Uper Hutt

POLLANDO: PEJ, Nowy Świat 27, Warszawa

SVEDIO: Ingrid Carlsson, Linderbergsvägen 4, Sundsvall

SVISLANDO: Tazio Carlevaro, Viale Stazione 23, CH-6500 Bellinzona

Nealiĝintaj

BRAZILIO: BEJO, Caixa Postal 18-ZC 00, Rio de Janeiro

ĈEĤOSLOVAKIO: Blanická 4, Praha 2

KANADO: Nicole Teasdale, 1778 rue Notre-Dame, Trois Rivières, P.Q.

KOLOMBIO: Oscar Dominguez, Apartado aereo 16194, Bogota 1

MEKSIKIO: Margarita Najera, Lauro Aguirre 243-3, Mexico 17, D.F.

Adresoj

Redakcio: Stefan Maul, Hubertstr. 2a, D 625 Limburg/Lahn, Germanio (FR)

Administrejo, al kiu oni sendu ĉiujn abonkotizojn, reklamojn ktp.:

Kontakto, Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

Presisto: Drukkerij De Kennemer, Wijkerstraatweg 178, Velsen-Noord, post: Beverwijk, Nederlando

Prezoj

Abono: 8 ndl. guld. = 32 steloj (jara-bono de minimume kvar numeroj); 2.20 ndl. guld. = 9 steloj (individua numero).

Reklamtarifo: 200 ndl. guld. por tuta paĝo; rabato por esperantistaj entreprenoj.

Bankisto de UEA: Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1, Nederlando.

Manuskriptojn por Kontakto oni sendu al la redaktoro en du ekzempleroj; ili devas esti klare tajpitaj en korekta esperanto, ĉiuj supersignoj devas aperi laŭ ĝusta formo, se necese enskribitaj permane. Oni skribu sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj granda maldekstra margeno. Manuskriptojn nepetitajn la redaktoro ne devas resendi. Li havas la rajton laŭ sia bontrovo modifi artikolojn. Por la enhavo de la artikoloj respondecas nur la subskribintoj mem, kies opinioj ne nepre akordiĝas kun opinioj aŭ principoj de TEJO kaj de la redakcio.



ENHAVO

La Mondo estas tuteca ..	3
La Botelo	8
Mirinda Lando Israel	9
expo 67 Montreal	10
Geskoltoj helpas	14
La Maljunulo kaj la Infano	17
Esperanto en la Milito ..	18
Mazaiko	19
Fotoj: DPSG (4), Adv. (2),	
AD (2.), FFP (1)	

La Mondo

estas tuteca



ĈIUJ HOMOJ ESTAS MIAJ NAJBAROJ

La mondo estas tuteca, ĝi estas tutaĵo — tion pruvas ĉiu tago denove. Ĉiuj homoj estas miaj najbaroj — pri tiu konsekvenco el la unua tezo ni ankoraŭ tro malmulte konscias. Kaj se ni konscias pri ĝi, ni ne agas laŭ tiu ekkono.

Se mi asertas, ke la mondo estas tutaĵo, tiu aserto bazas sur la empiria sperto ĉiutaga kaj sur la historia evoluo.

La historio de mondo kaj homaro tute klare montras jenan linion en la socia kunvivado: individuo - familo - grandfamilo - klano - tribo - gento - popolo - kulturkomuno - kontinenta komuno - monda kumuno - homar-familio.

Ni ankoraŭ ne staras ĉe la finpunkto de ĉi tiu linio, ja ofte oni havas la impreson — memoru nur la nuntempajn militojn — ke daŭros ankoraŭ jarcentojn, ĝis ni atingos la celon. Sed efektive la historio montras, ke la solidereco inter homoj kaj popoloj, la interligo de ĉiuj homgrupoj sur nia globo ade kaj konstante kreskis. Tiu kresko ne estas rekta, sed tre kurba: kvereloj, konfliktoj, militoj, subigo, revolucioj markas la historion de la homaro, sed ĝuste ĉi tiuj markoj aliflanke rapidigis la kunkreskiĝon de la homaro, kiel ajn malbonaj ili mem estis, kiom ajn da sango devis verŝiĝi, kiujn ajn maljustaĵojn devis suferi senkulpaj homoj.

Kompreneble tiun evoluon favoris ankaŭ la fakto, ke la nombro de homoj multobliĝis, tiel ke — por entute pluvivi — estis necese por la homoj agi kaj vivi solidare, ĝis fine en la hodiaŭa civilizacio la interplektiĝo de ĉiuj homoj kaj dependeco de aliaj fariĝis tiel striktaj, ke simpla striko de certa socia grupo povas efiki katastrofon, ĉar se iuj specialistoj subite

mankas, la aliaj specialistoj estas senhelpaj. Do la evoluo iris de aŭtarkio al specialiĝo, kaj tiu evoluo daŭras, ĉar hodiaŭ tutaj popoloj specialiĝas kaj tiel dependas de aliaj popoloj.

Tiom pri la historia aspekto de nia tezo, ke la mondo estas tutaĵo. La alia aspekto estas nia ĉiutaga sperto, kiu evidentiĝas al ni la tutecon de la mondo: La tekniko ebligas al ni, ke ni povas partopreni la vivon de ĉiuj homoj sur la tuta mondo. Se en la nuna momento akcidentiĝas ie ajn en la mondo aviadilo kun homoj, plej malfrue post unu horo ni ĉi tie scias tion kun ĉiuj detaloj. Se ie ajn en la mondo okazas tertremo, jam la postan tagon venas helpo el ĉiuj aliaj partoj de la solidara mondo.

Se ie ajn en la mondo okazas maljustaĵo al respektata homo, tuj venas protestoj de simpatiantoj en la tuta mondo.

Koncize: ni estas informitaj pri la vivo de la homoj en la plej fora lando same bone kaj rapide kiel pri tiu de nia rekta najbaro en la apuda domo.

Kaj tial do mi diras, ke ĉiuj homoj estas najbaroj. Sed ĉu ni estas ankaŭ bonaj najbaroj?

En niaj hodiaŭaj gigantaj urboj, en nia anonima socio bona najbareco ne estas memkomprenebla. Kiel ofte okazas al ni, ke dum jaroj ni vivas en la sama domo kun homo, kiun ni nur surpraĵe aŭ tute ne konas, kvankam li eble estus ideala amiko por ni; dume ni eble eĉ sentas nin solaj kaj izolitaj.

Aŭ kiel ofte okazas, ke mortas en granda domo iu homo, kaj nur post tagoj aŭ semajnoj liaj

najbaroj aŭ eĉ nur la poŝtisto aŭ alia oficisto rimarkas tion. Oni parolas en la okcidentaj landoj pri la neceso de najbarhelpo. Sed la sama postulo validas por tiuj popoloj kaj homoj, kiuj vivas aŭ mortas najbare de ni laŭ globa aspekto. Ankaŭ tie necesas najbarhelpo, nur la skalo estas pli granda, ĉar la dimensioj estas pli grandaj. Tamen niaj streĉoj kaj klopodoj ne estas adekvate grandaj.

Oni povas klasifiki la mondproblemojn, kvankam kutime ili estas interplektitaj sufiĉe intime. Tamen por ĉiu problemoj kun ĝiaj aspektoj necesas ankaŭ speciala agado. Kaj ĉi tie denove ni vidas specialiĝon: Tiu popolo aŭ lando, kiu estas specialisto sur la koncerna kampo, ankaŭ zorgu pri la koncerna mondkampo — kaj mondkampanjo.

Kiuj estas tiuj mondproblemoj? Ni povas nomi 5 gravajn: Malsato - malsano - analfabeteco - vivnivelo - demografio - el kiuj sekvas ĉiuj aliaj. Por ilustraj kaj imagi al vi mem la skalon de tiuj problemoj, bonvolu relegi en KONTAKTO 2/67 la NOMBROJN DE MIZERO.

Kaj nun diru iu al mi, ke vidalvide de ĉi tiu katastrofa situacio ni povas resti indiferentaj!

Sed la problemoj estas pli vastaj, ol supozigas la cititaj nombroj. Aldoniĝas aliaj dimensioj, ĉar samtempe la socialaj konfliktoj elkreskis al mondampleksaj formoj. Granda maltrankvileco, kiu ekkaptis la malriĉajn klasojn en la landoj, kie la industriiĝo kreskas, nun kaptas ankaŭ tiujn, kiuj havas preskaŭ ekskluzive agrikulturan ekonomion: ankaŭ la kamparulo ekkonscias pri sia neme-

ritita mairico. Al tio aldoniĝas la skandalo de ega maljusteco, ne nur en la posedo de la havaĵoj, sed ankoraŭ pli en la uzo de la havaĵo. En kelkaj regionoj malgranda grupo ĝuas ĉiujn rafinitaĵojn de la civilizo, dum la resto de la loĝantaro, malriĉa kaj maltrankvila, estas senigita de preskaŭ ĉiu eblo al persona iniciato kaj respondo, kaj ofte estas lokita eĉ en viv-kaj labor-cirkonstancojn, kiuj estas neindaj al la homa persono.

Krome la kolizio inter la tradiciaj kulturoj kaj la novaĵoj de la industria civilizacio rompas la strukturojn, kiuj ne adaptiĝas al la novaj kondiĉoj. Tiuj strukturoj, kelfoje tre rigoraj, estis la nemalhavebla subteno por la persono kaj familia vivo; la pliaĝuloj alkroĉiĝas al ili, dum la junuloj liberigas sin de ili kiel de senutila obstaklo kaj volonte turnas sin al novaj formoj de sociala vivo. La konflikto de la generacioj do plipe-


ziĝas pro tragiko dilemo: aŭ konservi la instituciojn kaj konvinkojn malnovajn, sed rezigni pri la progreso; aŭ sin malfermi antaŭ la tekniko kaj civilizacio, kiuj venas de ekstere, sed forĵeti kun la tradicioj de la pasinteco tutan sian homan riĉon.


Ĉiu homo estas vokita sin disvolvi. Ekde la naskiĝo al ĉiu estas donitaj ebloj kaj kvalitoj, por ke ili portu fruktojn. Ekipita per racio kaj libereco, li respondas pri sia progreso. Helppita, kelkfoje malhelpita de tiuj, kiuj edukas lin kaj vivas ĉirkaŭ li, ĉiu restas — kiuj ajn estu la influoj efikantaj sur lin — la plej grava arkitekto de sia propra sukceso aŭ malsukceso: nur per streĉo de sia intelekto kaj de sia volo ĉiu homo povas kreski laŭ homeco.

Sed ĉiu homo estas ankaŭ membro de la komuno: li apartenas al la tuta homaro. La kulturoj naskiĝas, kreskas kaj mortas. Sed kiel la ondoj de la altiganta tajdo pli kaj pli foren fluas sur la strandon, tiel ankaŭ la homaro iras antaŭen sur la vojo de la historio. Kiel heredantoj de la pasintaj generacioj kaj profitantoj de la laboro de niaj samtempuloj, ni havas devojn kontraŭ ĉiuj, kaj tiuj, kiuj post ni venos por pligrandigi la rondon de la homa familio, ne povas esti indiferentaj al ni. La universala solidareco, kiu estas fakto kaj bonfaro por ni, ankaŭ estas devo.

Tiu solidareco de la najbaroj do devigas nin al tio, kion ni nomas evolu-helpe. Sed evolu-helpe ne estas nur dono de mono kaj materialo, ĝia ĉefa celo devas esti: helpi por ke la helpitoj povu sin mem helpi.

Jam la biblio instruas, ke la tuta tero estas por la homo, se li estas preta doni forton de sia intelekto por fari ĝin produktema, per sia laboro pretigante ĝin por servi al li. Se la tero estas farita por havigi al ĉiu la rimedojn de ekzisto kaj la instrumentojn de progreso, tiam ĉiu homo havas la rajton trovi sur ĝi tion, kio por li estas necesa. Ĉiuj aliaj rajtoj, kiuj ajn ili estu, inkluzive de tiuj rilatantaj proprajn kaj liberan ko-





mercon, estas subordigitaj al ĝi: ili ne malhelpu ĝian realigon, sed male ĝin progresigu ĝuste. Tio signifas, ke la posedo de privata propraĵo por neniu estas senkondiĉa kaj absoluta rajto. Neniu rajtas uzi sian nenececan havaĵon nur por si mem, se mankas al aliaj io necesa. Se leviĝas konflikto inter akiritaj privataj rajtoj kaj komunaj postuloj unuarangaj, tiam la tasko de la publika potenco estas serĉi solvon kun la aktiva kunlaboro de personoj kaj sociaj grupiĝoj.

La komuna bonfarto do kelfoje postulos malposedigon, se bienkampoj, kiuj sekve de sia vasteco, pro sia malforta ekspluato aŭ malekspluato, pro la mizero, kiu sekvas el tio por la loĝantaro, pro la gava malutilo al la interesoj de la lando, estas malhelpo por la komuna bonfarto. Pri la disponeblaj enspezoj ne libere disponu la kapricoj de la homoj kaj egoismaj spekulacioj estu forigataj.

Starigo de industrio en la evolu-landoj tre urĝas. Ĉar tro multaj homoj suferadas, kaj la distanco inter la progreso de

kelkaj kaj la stagno aŭ malprogreso de la aliaj pligrandiĝas. Sed la tasko farenda devas ankaŭ harmonie plenumiĝi, por ke ne rompiĝu la nepre necesa ekvilibro. Improvizita agrikultura reformo povas maltrafi sian celon. Tro rapida industriigo povas renversi strukturojn, kiuj ankoraŭ necesas, kaj kaŭzi socialan mizeron, kiu signifus malprogreson por la homaro.

Estas situacioj, kies maljusteco krias al la ĉielo. Kiam tutaj popoloj, senigitaj de la plej necesaj vivrimedoj, vivas en dependeco, kiu rifuzas al ili ĉiun iniciaton kaj ĉiun respondecon, ĉiun eblon de kultura progreso aŭ ĉiun partoprenon en la socia kaj politika vivo, tiam granda estas la tento perforte forpuŝi tiajn maljustaĵojn, kiuj kontraŭas la homan dignon.

Ni scias tamen, ke la revolucia ribelado - escepte en la kazo de klara kaj daŭra tiraneco, kiu grave difektas la fundamentajn rajtojn de la persono kaj danĝere malutilas al la komuna

bonfarto de la lando — kaŭzas novajn maljustaĵojn, plie perturbas la ekvilibron kaj kondukas al novaj ruinoj. Oni ne povas forigi malbonon per pli granda malbono.

La persona iniciato sola kaj la libera ludo de la konkuro ne povas certigi la sukceson de la evoluiga laboro. Oni ne risku, ke la riĉo de la riĉuloj kaj la potenco de la potenculoj ankoraŭ pli kreskos, per kio la malriĉo de la mizeruloj kaj la sklaveco de la prematoj ankoraŭ pligandiĝos. Programoj tial necesas por kuraĝigi, stimuli, kunordigi, kompletigi kaj unuigi la aktivecon de la individuaj personoj kaj perantaj organoj. Apartenas al la publika potenco, elekti kaj indiki objektojn, celojn kaj rimedojn. Kaj la publika potenco devas stimuli ĉiujn fortojn, kiuj estas direktitaj al ĉi tiu komuna aktiveco. Sed ĝi ankaŭ zorgu, ke en ĉi tiu laboro partoprenu la privataj iniciatoj kaj la perantaj organoj.

Ĉiu programo, projektita por pligrandigi la produktadon, nur tiom havas pravon de ekzisto, kiom ĝi servas al la homo. Ĝia celo devas esti: repuŝi la malegalecojn, kontraŭbatali la diskriminacion, liberigi la homon el lia sklaveco, kapabligi lin memresponde efektiviĝi sian materian kaj moralan progreson kaj sian spiritan disvolviĝon. Koncize: evoluiga laboro estas fakte zorgi same multe pri la sociala progreso kiel pri la ekonomia. Ne sufiĉas kreskigi la riĉon komunan kaj juste dividi. Ne sufiĉas progresigi la teknikon, por fari la teron pli loĝebla al la homo. La eraroj, kiujn faris la jam evoluintaj landoj, devas averti evoluantajn pri la danĝeroj sur tiu tereno. La morgaŭa teknokratio povas kaŭzi same bedaŭrindajn malsanojn kiel la hieraŭa liberalismo. Ekonomio kaj tekniko nur havas sencon per la homo, al kiu ili servas. Kaj la homo nur estas reale homo laŭ la mezuro, en kiu li mem estas efektiva viganto de sia progreso.

Oni eĉ povas aserti, ke la kresko de la ekonomio unualoke dependas de la sociala progreso: sekve la baza eduko estas la

unua objekto de evoluiga plano. La malsato je instruiĝo fakte estas ne malpli prema ol la malsato je nutraĵo. Analfabeto estas ne-evoluinta spirite. Scipovi legi kaj skribi, ricevi profesian instruadon, signifas: ricevi memfidon kaj malkovri, ke oni progresas kune kun aliaj.


La homo estas nur li mem en sia sociala medio, en kiu la familio ludas ĉefan rolon. Ofte tro rigidaj kaj malbone organizitaj, la malnovaj socialaj kadroj de la landoj evoluantaj tamen necesas ankoraŭ dum kelka tempo, dum ilia tre firma ligilo iom post iom estas forigata. Sed la natura familo devas resti renkontiĝejo de la diversaj generacioj, kiuj helpas sin reciproke por akiri pli grandan saĝon kaj harmoniigi la rajtojn de la persono kun la aliaj postuloj de la socia vivo.

Rapida demografia kresko tro ofte aldonas kromajn malfacilaĵojn al la problemoj de la evo-

La plena disvolviĝo de la homo ne povas efektiviĝi sen la evoluo de la homaro en reciproka solidareco. La devo unualoke koncernas la riĉulojn; ĝi radikas en la natura frateco de la homoj kaj montriĝas laŭ tri aspektoj: la devo pri **solidareco**: la helpo, kiun la riĉaj landoj donu al landoj ankoraŭ evoluantaj; la devo pri **sociala justeco**: la riparo de malĝustaj komercaj rilatoj inter popoloj fortaj kaj malfortaj; la devo pri **universala amo**: la progresigo de multe pli homa mondo por ĉiuj, kie ĉiu povos doni kaj ricevi, kaj kie la progreso de unu ne estas obstaklo por la disvolviĝo de la alia. La problemo estas serioza, ĉar dependas de ĝi la estonteco de la tutmonda civilizacio.

Oni jam efike batalas kontraŭ la malsato. Ni nur pensu pri la agado de la Monda Nutra Organizo (FAO). Sed tio ne sufiĉas. Ne nur temas pri la venko su-

Tro multaj infanoj? Skotino scias helpon!



lulandoj: la amplekso de la loĝantaro kreskas pli rapide ol la disponeblaj helpofontoj kaj oni vidas sin evidente enfermita en malfacila pozicio. Tiam la tento estas granda, bremsi la kreskon de la loĝantaro per radikalaj aranĝoj. Certe la publika potenco, interne de la limoj de sia kompetenteco, rajtas interveni per adekvata informado kaj taŭgaj aranĝoj, kondiĉe ke ĝi respektas la legitiman liberecon de la geedzoj. Sen la neforigebla rajto je geedziĝo kaj generado ne ekzistas homa digno. La decido pri la nombro de iliaj infanoj apartenas al la gepatroj, kiuj devas serioze prijuĝi. Sed nur al la gepatroj!

per malsato, ankaŭ ne pri la repuŝo de malriĉo. La batalo kontraŭ la mizero, urĝa kaj necesa, prezentas mankojn. Temas pri tio, ke ni konstruu mondon, kie ĉiu homo, sen diferenco de raso, religio aŭ nacio, povas vivi plene hominde, libere de submetiĝo fare de homoj kaj naturo, kiun oni tro malmulte regas; mondon, en kiu libereco ne estas vana vorto kaj kie la malriĉulo povas sidi ĉe la sama tablo kiel la riĉulo. Ĉi tio postulas de la lasta multan noblanimecon, sennombrajn oferojn kaj senĉesan fortostreĉon. Ĉu li estas preta subteni per sia mono la laborojn kaj organizaĵojn, kiuj aktivigas por la plejmalriĉuloj?

Pagi pli multajn impostojn, por ke la registaro povu pligrandigi siajn evoluigajn penadojn? Pagi pli altajn prezojn por la importataj produktoj, por ke la rekompence de la produktinto fariĝu pli justa? Se li estas juna, forlasi sian patrujon por helpi la evoluon de la junaj nacioj?

La devo pri solidareco de individuoj estas ankaŭ tiu de popoloj. Kvankam estas normale, ke ĉiu popolo unue profitas el la frukto de sia laboro, tamen neniu popolo rajtas konservi siajn riĉaĵojn ekskluzive por propra uzado. Ĉiu popolo devas produkti pli multe kaj pli bone, ĉu por doni al ĉiuj siaj homoj vere homan vivnivelon, ĉu por kontribui al la solidara evoluo de la homaro.

Vidante la kreskantan malriĉon en la landoj evoluantaj, oni konsideru tion normala, ke evoluanta lando destino parton de sia produktaro por plenumi la bezonojn de tiuj, kiuj vivas en mizero; ke ĝi instruos instruistojn, inĝenierojn, teknikistojn kaj scienculojn, kiuj disponigas al ili konon kaj kapablecon.

La troabundo de la riĉaj landoj devas servi al la malriĉaj landoj. La regulon, kiu iam validis nur profite al la rekta najbaro, en la nuna tempo ni devas aplikati al la totalaj bezonoj de la mondo.

Papo Paŭlo VI en tiu kunteksto faris proponon, kiu ŝajnas utopia, se oni rigardas la politikan konstelacion de la mondo, kiu tamen eble estas la sola vera solvo de la problemo; li petis, ke oni fondu grandan mondfonduson, kiun oni provizu per parto de porarmadaj elspezoj, favore al helpo al la mizeruloj. Nur mondampleksa kunlaboro, kies simbolo kaj instrumento povus esti tia komua fonduso, povus venki la malfekundajn rivalojn kaj estigus fekundan kaj pacan dialogon inter ĉiuj popoloj.

Aliaj malhelpoj ankoraŭ kontraŭstaras la formiĝon de mondo, kiu estas pli justa kaj pli bone ordigita laŭ ĝenerala solidareco: naciismo kaj interrasaj antaŭjuĝoj.

Estas kompreneble, ke popoloj kiuj ĵus sendependiĝis, timople-

ne zorgas pri sia ankoraŭ rompebla nacia unueco kaj klopodas protekti ĝin. Estas ankaŭ normale, ke nacioj kun aktiva kulturo fieras pri la heredaĵo, kiun transdonis al ili la historio. Sed ĉi tiu legitima sento devas leviĝi al pli alta nivelo de amo, kiu ampleksas ĉiujn membrojn de la homa familio. La naciismo izolas la popolojn, kaj tio kontraŭas ilian veran bonfarton. Ĝi precipe malutilas tie, kie la malforteco de la naciaj ekonomioj postulas kuniĝon de fortoj, kono kaj financaj rimedoj por efektiviĝi la evoluigajn programojn kaj kreskigi la interŝanĝojn kulturalan kaj komercan.


*

La interrasaj antaŭjuĝoj ne ekskluzive apartenas al junaj nacioj, kie ili kelkfoje kaŝas sin malantaŭ la rivaleco de gentoj kaj politikaj partioj, sub preteksto de la justeco kaj kun danĝero por la interna paco. Dum la kolonia epoko interrasaj antaŭjuĝoj ofte furiozis inter koloniigantoj kaj indiĝenoj kaj tiel malhelpis fekundan reciprokan komprenemon, kreante multan venĝemon sekve de multaj maljustaĵoj. La antaŭjuĝoj ankoraŭ ĉiam baras la kunlaboron inter evoluantaj nacioj kaj estas fonto de disiĝo kaj malamo eĉ meze en la ŝtatoj, kiam individuoj kaj familioj vidas sin maljuste submetitaj al reĝimo de apartigo pri siaj raso aŭ koloro. Tiuj rasaj antaŭjuĝoj abundas ankaŭ en la eŭropaj landoj kaj trafas la studentojn kaj praktikantojn el evolulandoj, kiuj volas perfektigi en la evoluantaj landoj. Ĉi tie ni havas devon de gastamo. Nur se ni gastame akceptas ilin, ni povos protekti ilin kontraŭ la soleco, la sento de forlasiteco kaj la timo, kiuj rompas ĉiun moralan fortostreĉon. Kaj ankaŭ protekti ilin kontraŭ la nesana situacio, en kiu ili troviĝas, kaj en kiu ili estas devigataj kompari la ekstreman malriĉon de sia patrujo kun la lukso kaj malŝparo, kiuj ofte ĉirkaŭas ilin. Fine, precipe doni al ili en varma kaj frata gastamo la ekzemplon de sana vivo, la estimon pri la spiritaĵoj.

Dolore estas, ke multnombraj gejunuloj, venintaj al Eŭropo aŭ Ameriko, certe ricevas edukigon de granda kvalito, sed aliflanke tro ofte perdas la estimon pri la spiritaĵoj, kiuj troviĝas kiel altvalora heredaĵo en la civilizacio, en kiu ili naskiĝis.

Fine ni konsideru lastan aspekton de la tuta problemaro: La tro grandaj ekonomiaj, socialaj kaj kulturaj diferencoj inter la popoloj alvokas malfidon kaj malkonkordon kaj tiel endanĝerigas la pacon. Kaj tial efektive oni povas diri, ke la nova nomo de paco estas evoluo, kaj ke la paco savos nur, se ni zorgas pri bona evoluo de la mizeraj landoj. Ke ni povas fari tion, ni vidis. Ke ni devas fari tion — mi esperas, ke pri tio ĉiu el ni konscias. Do ni ne hezitu en nia tuteca mondo helpi al ĉiuj, ĉar ĉiuj homoj estas niaj najbaroj kaj bezonas nian najbaran helpon.

Stefan Maul



Vi kolektas por la nova infanhejmo!
Kiom da ili vi volas kunpreni?



LA BOTELO

Antaŭ multaj jaroj vivis en okcidenta Irlando malriĉa farmisto nomata Seán. Unu mantenon la luiganto venis por la lupago, sed Seán ne havis la monon por doni al li. La bienulo koleris. „Se vi ne havos la lupagon morgaŭ matene, mi eldomigos vin,” li diris kaj foriris. „Kion ni faru?” demandis Seán al sia edzino. „Nu,” respondis la edzino, „ni havas unu bovinon. Vi povas konduki ĝin al la komercejo kaj ĝin vendi.”

Seán tuj ekiris al la foirejo, sed survoje li renkontis vireton havantan longan blankan barbon. „Bonan tagon, sinjoro,” diris la etulo, „kien vi iras?”

„Al la komercejo, por vendi mian bovinon,” respondis Seán. „Mi aĉetos la bovinon,” la vireto diris.

„Bone,” diris Seán „Kiom vi donos al mi?”

La vireto elpoŝigis malgrandan verdan botelon. „Ĉi tiu botelo estas sorĉita kaj havas magiajn potencojn. Mi donos ĝin al vi kontraŭ la bovino. Kiam vi iros hejmen, metu la botelon sur la tablon kaj diru: „Botelo, agu!” kaj vi certe neniam bedaŭros. Kredu min, ĉar mi estas feo kaj feo neniam mensogas.”

Seán prenis la botelon, donis la bovinon al la etulo kaj ekiris al la hejmo.

Dume, la edzino atendis la revenon de sia edzo kaj kiam ŝi ekvidis lin, ŝi kuris al la pordo. „Ho, Seán,” ŝi kriis, „ĉu vi jam vendis la bovinon? Envenu rapide! Kie estas la mono? Kiom vi ricevis?”

Seán ne respondis, sed iris tuj al la tablo kaj metis la botelon sur ĝin. „Botelo, agu!” li diris. Du tre etaj viroj eksaltis el la botelo kaj komencis kovri la tablon per belaj oraj kaj arĝentaj pladoj, teleroj, taso kaj tiel plu, kaj tiam ili metis sur la pladojn viandojn kaj manĝaĵojn, dolĉajn fruktojn kaj kukojn, kaj en la tasojn ili verŝis vinon kaj viskion, kaj tiam ili malaperis ree en la botelon. Seán kaj la edzino estis mirigitaj. Ili eksidis ĉetoble kaj manĝis kaj trinkis ĝissate. Post tio Seán iris al juvelisto kaj vendis la tasojn, pladojn kaj tiel plu, kaj kiam venis la bienulo la sekvintan matenon, li havis la lupagon. Ĉiutage Seán metis la verdan boteleton sur la tablon kaj diris la magiajn vortojn, kaj post mallonga tempo li fariĝis tre riĉa viro.

Unumatene, kiam venis la luiganto, li diris al Seán: „Mi rimarkas, ke vi nun estas tre riĉa, kvankam vi antaŭe ne povis doni la lupagon al mi.

8

Mi gratulas vin, sed kie vi trovis la monon?” Kiam Seán rakontis pri la sorĉa botelo, la luiganto, kiu estis tre avida homo, diris al li: „Nu, amiko, vi estas tre riĉa kaj nenion bezonas krom vian propran domon. La domo ankoraŭ

apartenas al mi, sed se vi donos tiun botelon al mi, mi donos al vi la domon kaj ne plu revenos pro lupago.”

Seán konsentis kaj donis la botelon al la luiganto. Depost tiu momento la bonŝanco de Seán ŝanĝiĝis kaj li komencis plimalriĉiĝi ĝis venis la tago, kiam li denove havis nur unu bovinon.

Unu matenon la edzino diris al Seán: „Estas foiro en la urbo hodiaŭ. En la nomo de Dio prenu la bovinon kaj iru, kaj eble vi ree renkontos la blankbarbuleton.” Seán ekiris kaj en la sama loko sur la vojo li renkontis la vireton.

„Bonan matenon, sinjoro,” diris la feo. „Mi vidas, ke vi havas alian bovinon.”

„Jes,” respondis Seán, „ĉu vi havas alian botelon?”

„Certe jes,” la feo diris, kaj li elpoŝigis la botelon kaj donis ĝin al Seán, kiu siaparte donis la bovinon al la vireto.

Seán ne perdis momenton, sed kuris rapide hejmen kaj metis la botelon sur la tablon dirante: „Botelo, agu!” Du viretoj eksaltis el la botelo kaj tuj ili pligrandiĝis ĝis ili estis gigantoj. En la manoj ili havis bastonegojn kaj ili batadis Seán kaj lian edzinon ĝis ili kuŝis duonmortintaj sur la planko. Tiam ili reiris en la botelon.

„Ho ve!” diris Seán al la edzino. „Kion ni nun faru?” Sed tuj li komencis ridi. „Ho, karulino” li diris al la edzino, „mi ĵus ekhavis bonan ideon!” Li enpoŝigis la botelon kaj rapidiris al la domo de la luiganto. Kiam li atingis la domon, li aŭdis la sonon de muziko, kantado kaj dancado, ĉar ĉi tiun tagon la luiganto okazigis grandan festenon por siaj amikoj. Seán frapis la pordon kaj kiam la luiganto malfermis, Seán diris al li: „Sinjoro, mi havas alian magian botelon; ĉu vi deziras ke mi montru ĝin al viaj gastoj?”

„Certe jes,” respondis la luiganto, „bonvolu eniri.”

Seán eniris kaj la luiganto frapis la manojn kaj diris laŭtvoĉe: „Geamikoj, vi nun estas vidontaj mirindaĵon. Bonvolu alproksimiĝi al la tablo”. La gastoj ĉirkaŭiris la tablon, kaj Seán metante la botelon sur ĝin diris: „Botelo, agu!” kaj kuris malantaŭ la pordon. La viretoj eliris el la botelo, pligrandiĝis kaj komencis bati la luiganton kaj la gastojn senkomplete.


„Prenu vian malbenitan botelon el mia hejmo!” kriis la luiganto.

„Mi faros tion, kiam vi redonos al mi la alian botelon,” diris Seán.

„Prenu ĝin,” respondis la luiganto, „ĝi stards sur la libroŝranko.” Seán prenis sian botelon kaj hejmeniris. Kaj li kaj la edzino vivis feliĉe dum la resto de sia vivo.

(El la irlanda lingvo libere tradukis Liam Carson)

MIRINDA LANDO



ISRAEL

Ĉi tiu revuo laŭ la principoj de TEJO estas neutrala, tial — malgraŭ ke ĝi estas la plej aktuala kaj interesa aspekto — mi ne povas paroli pri la politika situacio en Israelo kaj la Meza Oriento, kiel mi ekkonis ĝin okaze de vizito dum aŭtuno 1967. Sed certe estas permesite al mi raporti pri tiu mirinda lando Israelo, ĉar eĉ plej pedanta leganto el mia laŭdo por Israelo ne povos konkludi mallaudon aŭ malamon kontraŭ araboj. Cetere mi kompreneble rajtas nomi faktojn, ĉu agrablajn por iu ajn, ĉu ne.

Septembro havas en Israelo veteron sufiĉe taŭgan por eŭropa vizitanto: varma ĝis varmega, sen pluvo, kun agrabla venteto. Kiam mi forlasis la Boeing 707 de EL AL (la israela flugasocio) en la flughaveno Lod, mi tuj ekŝvitis kaj ŝvitadis ĝis mi denove eniris la maŝinon por reflugi.

La unuajn impresojn pri Israelo mi akiris en Jafo kaj Tel Aviv, du urboj (kŭnaj) diferencaj ne nur laŭ aĝo, sed ankaŭ laŭ karaktero. Sed ĉi tiu impresado validas por la tuta lando: unu apud alia staras plej antikva historio kaj plej moderna vivo, staras ruinoj kaj restaĵoj el preskaŭ praa tempo kaj gigantaj domegoj kaj plej modernaj konstruaĵoj — simbolo por tiu ŝtato, kiu post 2000-jara paŭzo de neekzisto revekiĝis al vivo, kiu tamen ne estas simpla komenco, sed kontinuo, ĉar konscie la juda popolo revivigis sian plurjarmilan tradicion ankaŭ en la moderna ŝtato Israelo. Tion montras jam la fakto, ke kontraŭ ĉiuj avertoj de lingvistoj oni reenkondukis kiel oficialan lingvon la malnovan hebrean de la biblio, fakte do lingvon kiun la lingvistoj kvalifikis „morta”.

Tamen la eksperimento sukcesis plene: hodiaŭ la unuiga lingvo estas la hebrea (kiun la junularo paroles perfekte, kaj nur ĝin!), dum la multaj aliaj lingvoj kunportitaj de la enmigrintoj pli kaj pli perdas terenon. Ili ludas gravan rolon kompreneble en kulturo, komerco kaj

eksterlandaj rilatoj, sed ne en la propre landaj aferoj mem.

Kiel oni sukcesis? Tre simple: oni ne nur dekomence instruis ĝin en la lernejoj, sed ankaŭ ĉiu enmigrinto unue devis lerni ĝin.

Do per ŝtata potenco oni enkondukis tiun novan-malnovan lingvon, kiu en certa senco estas ankaŭ „artefarita” lingvo kiel Esperanto.

Ĝi ankaŭ bezonas „lingvan akademion”. Efektive la paralelo al Esperanto estas frapa. Nur: ĉe Esperanto mankas la potenco enkonduki ĝin....

Ankaŭ alisence la nova ŝtato konstruis sur tradicio: la juda religio ludas decidan rolon en la juda ŝtato, ja la interplektiĝo de religio kaj ŝtato estas tiel strikta, ke por eŭropano parte estas nekompreneble, kiel moderna ŝtato povas permesi al si tian grandan religian influon. Ekz. la sabat-leĝoj (pure religia afero) kondukas al la neimagebla fenomeno, ke la tutmoderna duonmiliono urbo Tel Aviv de vendreda ĝis sabata vespero similas al senviva, ja morta provinco-urbeto, ke ne veturas publikaj trafikiloj, ke en la hoteloj oni ne rajtas fumi ktp.


Uunflanke mi estas certa, ke tuj kiam tiu ŝtato estos libera de eksteraj problemoj, ekestos akra konflikto inter liberalismo kaj religio (ĉar fakte la ortodoksaj religiuloj estas ega minoritato kaj la plimulto de la loĝantaro ne estas kontenta pri la severaj leĝoj), aliflanke estas mirige konstati, ke — kontraste al ĉiuj

aliaj modernaj ŝtatoj — la junularo pli kaj pli malkovras la religion de la prapatroj. Tiel ekz. vizitante sinagogojn mi vidis ne malmultajn junulojn, kiuj estis eĉ pli serioze preĝantaj ol la plenkreskuloj. Supozeble la kaŭzojn por tiu kreskanta religieco oni devas vidi unu-aloke en la biblio mem, kiu en ĉiuj lernejoj ja estas la ĉeflegaĵo kaj la historia libro. Sed kvankam oni diras: la biblio ĉefe por ni estas historia, ne religia libro, estas klare ke ĝi ne povas resti senimpresa kaj seninflua, ĉar finfine temas pri religia historio. Kaj krome estas nekontesteble, ke judo per si mem devas esti religia, se fakte li volas esti judo.

El la religia perspektivo oni ankaŭ devas vidi la sintenon pri la estonta ŝtato de Jerusalemo: „Neniu registaro en Israelo povus permesi al si redoni Jerusalemon, se ĝi volas resti potenca”, diris ĉefredaktoro de israela ĵurnalo al mi. Ĝis la somera milito de 1967 judoj ne povis viziti siajn sanktajn lokojn en la jordania parto de la urbo, kvankam laŭ la batalhaltaj decidoj de 1949 ili devus havi liberan aliron.


Sed kio pleje mirigis min kaj kion mi pleje admiris en Israelo, ne estis sanktaj kaj historiaj lokoj, sed la enormaj kaj neimageblaj konstruado kaj pionirlaboro faritaj dum la lastaj jardekoj. Se oni vidas sablon kaj dezerton kaj kion oni faris el ili: florantaj ĝardenoj, verdaj arbaroj, paradize fruktorigaj kampoj, vere oni devas havi altan respekton al tiuj judoj, kiuj dum dumil jaroj apenaŭ

daŭrigo p. 18)



expo67


Montreal



La mondekspozicio en Montreal (Kanado) fermis siajn pordojn. La ĉi-jara ekspozicio ne lasas tian deficion, kian ekz. lasis la (neoficiala) en Novjorko. Fakte ĝi sukcesis pli bone ol oni imagis, kvankam ĝi situis tiel longe for de Eŭropo.

Aliflanke pli kaj pli oni demandas sin, kian sencon havu tiaj superlativaj mondekspozicioj en politike, ideologie kaj sociale disŝirita mondo. Ĉu ili vere povas dokumenti unuecan kaj pacan mondon? Ĉu ili nur glori la teknikan progreson de la homaro? Aŭ ĉu denove ĝi servas nur al politika kaj ideologia propagando? Ĉu la miliardajn sumojn oni ne povus multe pli bone uzi por la vera progresigo de la homaro?





„La Homo kaj lia Mondo” estis la moto de la expo 67, kiel slogane oni nomis ĝin. Sed ĉu vere la vizitantoj vidis la homon (do ankaŭ sin) en lia (en ilia) mondo, ĉu ili vidis homecan mondon, ĉu ili vidis mondan homon?


12

Mi ne scias. Mi ne povis viziti ĝin. Certe, impona ĝi sendube estis. Sed ĉu ĝi estis vera, ĉu ĝi helpis solvi niajn grandegajn problemojn, la problemojn de la homo en lia mondo? Mi multe ĝojus, se oni povus fidine jesii tiun demandon.

Niaj bildoj montras la loĝurbon „Habitat”, kiu restos la memoraĵo pri la ekspozicio, kiun Kanado aranĝis en la 100a jaro de sia ekzisto. (Origine la mondekspozicio okazis en Sovetunio, sed ĝi rezignis, kvankam ĝi festas ĉi-jare 50jaran jubileon: tro multekosta... oni argumentis).

Kelkaj landoj estis tiel prudentaj, kunigis siajn ekspoziciojn en unu komuna pavilono.


Sed por reveni al „Habitat”: Estas tute nova ideo, loĝigi multajn familiojn sur malgranda placo en urbo tute kunkonstruita, tamen kun loĝejoj tute apartigitaj kaj havantaj propran ĝardeneton. Eble la estonta loĝostilo?



Interesa ankaŭ estas la globforma usona pavilono, kiu konsistas tute el reto kaj travidebla haŭto.
Alia pavilono, tiu de Jugoslavio (la bildo montras la modelon), estas interesa pro

la fakto, ke oni konstruis ĝiajn partojn en Jugoslavio mem, transportis ilin al Kanado kaj en Montreal nur muntis ĝin. Nun oni povas malmunti kaj uzi ĝin por aliaj okazoj. Ankaŭ aliaj ŝtatoj faris tion.

s.m.





En tendaro de la kriplaj skoltoj plej multo estas postulata: kuiri, ordigi la tendon, purigi la tendojn, migri, sporti kun kaj kontraŭ la sanaj skoltoj.

GESKOLTOJ

HELPAS

14

Per lertaj manoj por kripla junularo

La mizero estas kaŝita malantaŭ muroj, en solecaj ĉambroj kaj sur balkonoj. Ĝiaj nomoj estas: lameco, akcident-kripligo, dismelio, spiritmalsano... Ĝi havas mil nomojn. Oni taksas ke sole en Germanio estas 3,7 milionoj tiaj kripluloj, kaj 200.000 el ili estas pli junaj ol 16 jaroj, do infanoj.

Oni devas lavi, nutri, vesti ilin. Mem fari ili ofte povas malmulte, kaj ne malofte preskaŭ nenion. Certe, oni tre bone prizorgadas ilin, en tiu rilato ili fakte ne multe suferas.

Al tio oni kutimiĝas.

Ilia mizero estas alia: Ekz. multaj el ili ne povas viziti lernejojn aŭ specialajn lernejojn, kio signifas ke iliaj ŝancoj por la vivo estas multe pli malgrandaj ol ĉe normalaj infanoj. Sed aldoniĝas alia, multe pli grava problemo: tiu de la amo. Antaŭjuĝoj kaj tabuoj de la kunhomoj faras el ili randfigurojn de la socio, izoligas ilin. Brutala estas tiu konduto de la socio, ĉar iun tagon ili ekkonscias plej klare kaj kun ĉiuj konsekvencoj: mi estas malhelpita, elpuŝita, ne povas partopreni la vivon de sana junularo, la socio ne volas min...

Estus iluzio esperi ke tiuj idiotaj antaŭjuĝoj baldaŭ foriĝos." Necesas malgrandaj paŝoj por dum longa tempo ŝanĝi tiun konduton de la socio. Tian paŝon faras ĉiujare la germanaj geskoltoj de PSG kaj DPSG. Sub la devizo „lertaj manoj kaj piedoj helpas malhelpitajn gejunulojn” ili atentigas diversmaniere la publikon pri la mizero de la kripluloj, ili laboras por uzi la gajnitan monon por integri la malhelpitajn geknabojn en la normalan junularan socion. Ili formas kun ili grupojn kaj tendumas komune — sanaj kun malsanaj junaj homoj. Ili helpas la kriplulojn pravi al si mem kaj al aliaj, ke malgraŭ ĉio ili ne estas senutilaj, ke multe pli ili povas fari ol oni supozus. Tio mobilizas novajn fortojn en ili.

Ke tiu agado kaj tiuj klopodoj ne estas facilaj, kaj ke ili kostas monon sufiĉe multan, oni ja povas imagi. Specialaj iloj kaj



Sanaj skoltoj vivas kun malsanaj en unu tendo, ili ludas kaj laboras kune, ili helpas unu la alian ĉiu laŭ siaj eblecoj.



Gajaj ludoj. Multa fantazio kaj muzaj talentoj karakterizas la kriplajn skoltinojn.




Sencoplana okupo, interesaj taskoj kaj multa amo kaj komprenemo jen la elementoj de la laboro kun kriplaj junaj homoj. La skoltoj klopodas pri tio.

instrumentoj, specialaj aŭto-transportoj, kuracista hepo, specialistoj... Sed la agado estas sukcesa. Ĉar skoltoj ne nur havas lertajn manojn kaj piedojn, sed ankaŭ prudentajn kapojn. Kaj tiel


ĉiam novajn eblecojn ili trovas por havigi la monon necesan: per ŝupurigado sur la stratoj, per rikolta helpo ktp. Sed ne nur germanajn kriplulojn ili helpas, ili ankaŭ uzas la monon por similaj agadoj en

aliaj landoj: Kongo, Kameruno, Brazilo kaj Ĉilio, laste ankaŭ Bolivio. Jen evoluhelpo de tute speciala fako. Vere, kiu ne ĝojus pri tiaj geknaboj?

W.K.



LA MALJUNULO KAJ LA INFANO



Dum la epoko de la brutalaj agento-filmoj kaj la ŝokfilmoj el la paĉja kinejo filmo de Claude Berri „La Maljunulo kaj la Infano” fargis evento, kvankam ĝi estas nur nigra-blanka filmo en normala formato, do rezignas pri koloro kaj larĝformato. Ĉi tiu unuarigarde tiel modesta filmo ricevis multajn premiojn kaj la ĉefrolulo, la franca maljuna aktoro, nestoro kaj vera artisto, ricevis la arĝentan urson, la premion de la filmfestivaloj de Berlino.

Estas la unua pli granda filmo de la juna reĝisoro kaj aktoro Claude Berri (32), kiu pro t.n.

kurt-filmo jam ricevis Oscar-premion. Ĝi rakontas pri la amo de maljuna viro kaj juda infano. Tiu rakonto havas membiografiajn trajtojn de la aŭtoro kaj reĝisoro Berri. En 1944 en de germanoj okupita regiono de Francujo juna juda geedza paro devas kaŝi sin pro la Gestapo (la hitlera sekret-polico, kiu ĉefe persekutis la judojn). Sian solan fileton la geedzoj transdonas al bona nejudamikino, kiu transportas la infanon al siaj gepatroj en Alpa vilaĝo proksime de Grenoble. La maljuna paro kun malfermitaj brakoj akceptas la fileton Claude kaj

baldaŭ kreskas intima amikeco inter la 8jarulo kaj la grumbla avo, kies mondbildo estas destinita per tre simplaj skemoj: pri ĉio kulpas la britoj, bolŝevikoj, frimasonoj kaj judoj.

Lia „nepeto” scias jam pli bone, sed ruze aŭskultas la avon kaj kondukas lin ofte en kontraŭdirojn, sen ke la avo tuj rimarkas tion. La idilio trovas sian finon en la fakto, ke la milito finiĝas kaj Claude reiras al siaj gepatroj — dum la maljunulo tute ne scias, ke li havis dum la tuta tempo judan infanon sub sia tegmento, infanon de popolo, kiun li malamas. Restas du mal-



gajaj homoj, kiuj neniam ekscios, ke tiujn feliĉoplenajn monatojn ili dankas ĝuste al juda infano...

La aktoroj, Michel Simon (73) kaj Alain Cohen, vere estas bonegaj. La kritikistoj diras eĉ, ke Alain estas „mirakla infano.” Sed ankaŭ la reĝisoro metis en tiun filmon tiom da humoro, ĉarmo kaj amo kaj malgraŭ ĉio freŝeco, ke oni nur senrezerve povas aplaŭdi la tutan filmon. Berri diras pri Simon: „Eble mi tute ne povus fari la filmon sen Simon. Estis lia poeta dimensio, kiu inspiris min dum la verkado de la libro, kiel ĝi ankaŭ ĉiam gvidis min dum la estiĝo de la filmo. Aktorojn de lia formato oni ne gvidas. Oni skribas rolojn, figurojn por ili, kaj ili interpretas.”

Fakte tia filmo estas raraĵo en la hodiaŭa produktado. Kaj ĝi montras, ke malgraŭ ĉiu supraĵeco de la ordinaraĵ filmoj filmo tamen povas esti arto.

sm/FPF

MIRINDA LANDO

(daŭrigo de p. 9)

estis kampanoj. Estas vere la biblia „laŭdata lando”.

Estas lando de akvoturoj kaj akvokondukiloj. En tio la israelanoj estas majstroj, veraj fakuloj, ja nun ili eĉ majstras la akvoproblemon por la tuta lando ĝis la dezerto Negev: giganta akvokondukilo fluigos la akvon de Jordano el la nordo tra la tutan landon ĝis la suda Negev.

La kibucoj, tiu aparta agrar-komuno ekzistanta nur en Israelo, havas la plej grandajn meritojn pri la impona agrikultura progreso, kvankam en la kibucoj vivas eĉ ne 10% de la loĝantaro. Sed el la kibucoj, tiuj intelektulaj vilaĝoj, venas ankaŭ multaj spirite kaj politike eminentaj personoj. Tamen la junularo iom post iom fariĝas skeptika pri la vivo-formo kibuca kaj estas tendenco de cer-

ta fuĝemo. Ĉar la industriigo ankaŭ enorme progresas (kaj eĉ la kibucoj partoprenas ĝin, ne laste pro la fuĝemo), universitatoj kaj teknikaj altlernejoj vokas, la pulsanta urba vivo logas. Eble la kibucoj estas en krizo, tamen ili tiel apartenas al la moderna Israelo, ke apenaŭ ili foriĝos.

Mi ofte dum kaj post mia restado en Israelo cerbumis, ĉu la homoj en tiu lando estas feliĉaj. Ĉar tre baldaŭ mi rimarkis, ke ne nur la plenkreskuloj kaj maljunuloj, kiuj pasintempe ja devis suferi ĝis neelteneblo, kies sortoj estis ĉio alia ol feliĉigaj, sed ankaŭ la junularo kutime portas seriozajn, ja malafablajn trajtojn.

Nur infanoj kaj geamantoj ridis senplue. Kial? Baldaŭ mi komprenis. Estas tiu konstanta premo de danĝera politika situacio, estas la energion postula progresigo kaj konstruado, estas la heredaĵo de dumiljara persekutiĝo, kiu kreis tiujn trajtojn. Tamen, se oni afable parolas kun la homoj, ili sereniĝas kaj afabliĝas. Kaj fakte estas ne nur melankolia (la belaj israelaj kantoj pravas tion sufiĉe), sed ankaŭ gaja kaj vivema popolo.

Cetere, en la tuta lando mi vidis nur manplenon da „longharuloj”, kaj ili estis — britoj... Sed kion mi aparte devas noti: mi ne vidis knabinon en Israelo, kiu ne portis mini-jupon. La israelaj knabinoj povas tion permesi al si senescepte, ĉar mi ankaŭ ne vidis vere malbelan knabinon tie, male vidis tiom da belulinoj kiom en neniu alia lando ĝis nun. Sed eble tio estas subjektiva observo.

Nu, tiuj kelkaj aspektoj sufiĉu por peri al vi imagon pri tiu lando, vere mirinda lando, kie prahistorio kaj plejmoderno geedziĝis kaj vivas tre harmonie. Ni deziru al Israelo kaj la tuta Meza Oriento, ke baldaŭ ankaŭ venu la politika harmonio, ke venu tio, per kio oni ĉiutage salutas vin en Israelo: ŝalom — paco, ĉar paco mankas al tiu pacama kaj admirinda popolo.

Stefan Maul

ESPERANTO EN LA MILITO

Ivan Ŝirjaev, rusa esperantisto, verkisto kaj iniciatinto de la en Budapeŝt aperinta Enciklopedio skribis rakontojn diverstemajn, precipe el la tiea rusa vivo. Nin interesas la rakonto LA MALAMIKO, kiu aperis en la Esperanto Biblioteko de Muusses en Nederlando antaŭ la dua mondmilito.

Vive li priskribas okazintaĵojn dum la unua mondmilito en pola vilaĝo, kie rusa kapitano demandas la milit-kaptitajn oficirojn. El la ĵus enkondukitaj kvin oficiroj kvar estas germanoj kaj unu estas hungaro. Tiu ne scias ruse kaj germane, do nek la rusaj oficiroj nek la tradukisto komprenis lin; vane li provis ion klarigi per multaj gestoj.

La militkaptitoj devas doni tion, kion ili havas en tornistroj kaj poŝoj. La hungaro ĉion elmetas, sed kiam li eltiras el sia jako paperfolion, li laŭte ekploras. Estas ia infanskribaĵo.

Ĝi ŝajnas grava kaj karega por li. Sed li vane klarigas hungare. La ĉeestanta deĵoranta leŭtenanto subite aŭdas la vorton „Esperanto”.

„Ĉu vi estas esperantisto?” La hungaro sereniĝas kaj ĝoje, fervore ekparolas: „Nun jam estas ebla la interpretado!”

La hungara oficiro klarigas, ke la letereton skribis al li lia filineto. Li laŭtleĝas la tutan tekston, kiu estas en Esperanto. La etulino lernis ĝin por plaĉi al sia patro. Depost tiam pasis du jaroj, pliaj sciigoj ne venis; li timas, ke ŝi mortis kaj ankaŭ la malforta edzino. La letero, kovrita per kisoj kaj larmoj, estas lia sola trezoro.

La rusa kapitano kortuŝiĝas. Ankaŭ li havas fileton, kiu nun malsanas. Li prezentas manĝon, cigaredon al la hungaro. Ambaŭ rakontas pri siaj infanoj, amikiĝas — per interpretado de Esperanto — kaj la kapitano eĉ sian liton donas por la nokto, havante ja deĵoron. La hungaro ricevas sian leteron kaj la malamikoj varme, kortuŝe kisas unu la alian.

Kaj la kapitano daŭrigas severtone, rigide la demandadon al la ceteraj militkaptitoj.

Pál Balkányi

MOZAIKO

Citajoj

Kelkiu vidas ovon kaj jam volas aŭdi ĝin kikeriki.

Tsuang Tse

Multaj nur tial ne perdas sian prudenton, ĉar ili ne havas.

Gracian

La mondo estas plena da X-gamboj, kiuj ridas pri la O-gamboj.

La Rochefoucauld


*

TABUO DE SKLAVECO

Laŭ taksado de la UN-komisiono pri homaj rajtoj ankoraŭ surtere vivas 2.000.000 sklavoj. Sed la sklavo-problemo ŝajne estas tabua. Ĝis nun la potencaj okcidentaj nacioj entreprenis nenion kontraŭ la sklav-komercio, por ne ĉagreni la ole-riĉajn landojn de Meza Oriento.

Sed la malforteco de UNO mem montriĝis, kiam oni volis transdoni tiun demandon al ĝi. La afrik-azia bloko sukcese rifuzis trakti tiun temon en la plen-sembleo.

Konataj estas jenaj sklavo-regionoj: Tamansaset (Alĝerio); Rei-Bonba-distrikto de Kameruno; en Libanono (domservisto kostas ĉ. 350 dolarojn); Sierra Leone (laboristo kostas 1800 dolarojn); en Bombay junaj knabinoj kostas kelkajn dolarojn; Maŭretanio; en Singapuro sklavinaj estas en bordeloj; en Brazilo kaj Peruo oni scias pri indianaj sklavoj; en Meksiko knabin-komercio estas pruvebla; libiaj komercistoj vendas sklavojn pilgrimante survoje al Mekka...




KURIOZE ĜIS RIDINDE

En la parlamento de Brasilia deputito deklaris: „Mia partio nek poras nek kontraŭas, sed tute male - kaj precipe tion.”

NI LUDAS:

Tablo-hokeo



La ĉefredaktoro de provinc-gazeto en Oklahamo (Usono) pardonpetis ĉe la legantoj pro vera epidemio de preseroj per jena informo: „Antaŭ kelkaj tagoj ni translokiĝis. La vortoj, kies ofografio estas malfacila, ĉiuj estas notitaj sur la muroj de nia malnova redaktejo.” (ne validas por „kontakto”...)

Grandlavejo en Jackson (Usono) okaze de malfermiĝo disdonis lotilojn. La ĉefpremio estis: senkosta lavado de la tolaĵo por la tuta vivo. La gajninto estis s-ro David Wiggins, posedanto de hotelo kun 120 litoj...

La trejnisto de Brusela naĝoklubo ricevis honor-insignon pro sia merit-plena agado. Kiam li naĝu honoran rondon, oni konstatis, ke li estas — nenaĝpova...

Nur estante jam en la super Skandinavia fluganta aviadilo, moskva sinjorino memoris, ke hejme ŝi forgesis malŝalti la elektran gladilon. La kapitano de la maŝino — flugo Moskvo-Parizo — alarmis la fajrobrigadon en Moskvo. Kiam la sinjorino alvenis en Parizo, oni transdonis al ŝi telegramon: „Eniris tra fenestro en oka etaĝo. Fajro malhelpita.”

La urba konsilantaro de Middletown (Usono) decidis jenon: „Ni konsentas konstrui novan karceron, kondiĉe ke oni uzas la brikojn de la malnova. Ĝis la nova estos preta, oni uzu la malnovan karceron.”

Ni proponas al vi novan ludon, kiu ne nur estas interesa, sed kiun ankaŭ facile mem ĉiu el vi povas fari. Rigardu nur la bildon, kaj fakte vi jam ĉion komprenas: Breto kun multaj pordetoj dividas la tablon en du kampojn. La breto kompreneble devas esti tiel larĝa kiel la tablo, ĝi estu proksimume 15 cm alta. Uzu stabilan lignon, desegnu la ĉ. 6 cm larĝajn kaj altajn pordetojn sur la breton kaj segu ilin. La distanco de unu pordeto al la alia ankaŭ estu 6 cm. La elsegitajn pecojn oni uzas kiel pordojn, fiksante ilin aŭ per malgrandaj ĉarniroj aŭ per simplaj linostrioj (kiujn oni algluas). Eventuale oni fajlu la segorandojn iomete. Atentu, ke la nombro de la pordoj estu para kaj ke oni devas malfermi ilin alterne. Fine oni bone glatigas la lignon kaj farbas ĝin.

Nun la du hokeo-batiloj: iliaj teniloj estas 25 cm longaj stangetoj (rondaj). La hokeo-formon oni desegnas sur maldikan breton (plej bone foli-ligno) kaj ankaŭ segas ilin. En la stangeton oni tranĉas ĉe la suba fino fendon, kiu precize taŭgas por akcepti la hoke-bretojn, tiel ke oni povas glu-fiksi ilin. Eventuale oni povas uzi ankaŭ malgrandajn (malpintajn) najlojn.

La batilon oni ankaŭ bone glatigas kaj lakas ĝin; laŭdeziro oni povas vindi ĉirkaŭ ĝi ankaŭ fadenojn (baston) kaj fiksi la fadenojn per gluaĵo (kiun oni ŝmiras simple sur la lignon).

Kaj nun vi jam povas ludi: La breto staras pro la malfermitaj pordetoj. Oni uzas normalajn tablo-tenisajn pilkojn aŭ gumopilketojn en la sama grandeco. La ludantoj staras ĉe la mallarĝaj flankoj de la tablo. La lud-regulojn vi mem povas starigi laŭplaĉe.

"Reĝo Lear faras decidan antaŭpaŝon en la kampo de la viva dramo."

A. D. Foote en British Esperantist

"La fideleco, al kiu la tradukinto celis, estas plene atingita, kaj al tio nenio estas oferita el la majesta poezio de la originalo."

D. B. Gregor en Heroldo

"Neniu franca traduko povas atingi la altan gradon de ekzakteco trovebla ĉe la Kalocsay-a traduko."

Robert Martin en Franca Esperantisto

"Kalocsay pruvis ankoraŭfoje sian majstrecon. Mi havas la impreson, ke Reĝo Lear estas lia atuto."

William Auld en la revuo Esperanto

REGO LEAR

Tolbindita: 16,50 gld. Broŝurita: 14,— gld.

Eldonita de UEA

NOVA DISKO !

Kantas:

Ramona van Dalsem

akompanas:

TOOS SCHOONMAN

La Feliĉo

kaj ses aliaj kantoj en esperanto

La plimulto de la tekstoj kaj melodiĵoj estas verkitaj de la kantistino mem, kiu gajnis per tiuj ĉi kantoj la **unuan premion** en amatora konkurso en Nederlando.

Senriproĉa prononco
Klarega lingvo

Fleksebla, nerompebla, plasta materialo
Eldonis: U.E.A. Prezo: 2,50 gld., 10 steloj
Aldonu 10 % por sendkostoj

Mendu tuj ĉe U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando. Poŝtkonto 378964

ESPERANTO

estas la plej internacia Esperanto-revuo en la mondo, kun legantoj en ĉ. 80 landoj

ESPERANTO

estas via revuo kaj dependas de via apogo

Diskonigu ĝin ! Varbu por ĝi
abonantojn (18,75 gld. jare) kaj
Membrojn-Abonantojn (25,— gld. jare)

Petu kvanton da aboniloj de la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

Sendigu specimenan ekzempleron al viaj amikoj ne-abonantoj

IVO LAPENNA

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ

La Unua Parto konsistas el 16 paroladoj faritaj inter 1950 kaj 1966 dum la Universalaj Kongresoj aŭ en aliaj okazoj, inkluzive la pledojn por Esperanto en la Ĝeneralaj Konferencoj de UNESKO en Parizo (1952) kaj Montevideo (1954).

La Dua Parto enhavas tri tekstojn pri la lingva problemo en la internaciaj rilatoj, D-ro L. L. Zamenhof kaj U.E.A., kiuj povas esti taŭge utiligataj aŭ komplete aŭ parte ankaŭ por prelegoj, radioelsendoj, artikoloj aŭ informoj.

ĈIU leginto de **RETORIKO**, **ĈIU** persono, kiu iam aŭdis la aŭtoron paroli, certe havigos al si tiun ĉi libron, kies enhavo iusence signalas la etapojn de evoluo de la Esperanto-Movado en la eventoplenaj 16 jaroj, al kiuj ili rilatas.

Eldono de la aŭtoro.

Proks. 150 pp., formato 20 x 15 cm (kiel Retoriko), plaste bindita.
Prezo: 11 gld. aŭ 44 steloj. Mendu ĉe UEA !